Kaj diras al ĝi:

"Kukobulo, kukobulo! Mi vin formanĝos!"

Sed kukobulo respondas:

"Mi estas tra farunujoj skrapita, tra grenejo balaita, en fornon metita, sur fenestro malvarmigita! Mi de avo foriris kaj de avino foriris! Kaj de vi, leporo, mi eĉ pli facile foriros!" Kaj ekruliĝis pluen.

Renkontiĝis al kukobulo lupego-per-dentoj-krakego.





Vizitu mian retejon

**- mildegard.ru -**

por legi rakontojn kaj

komiksojn en Esperanto



# KUKABULO

kun bildoj de N. Ermak

Bakis maljunulino kukobulon. Kaj metis sur fenestrobreton por ke ĝi malvarmiĝu.

Sed kukobulo saltis eksteren el fenestro kaj ekiris kien okuloj rigardas.

Iras, kantojn kantas, anserojn kaj kokinojn timigas:

"Mi estas tra farunujoj skrapita, tra grenejo balaita, en fornon metita, sur fenestro malvarmigita! Mi de avo foriris kaj de avino foriris!

"Kukobulo, kukobulo! Mi vin formanĝos!"

Sed kukobulo respondas:

"Mi estas tra farunujoj skrapita, tra grenejo balaita, en fornon metita, sur fenestro malvarmigita! Mi de avo foriris kaj de avino foriris! Mi de leporo foriris, de lupo foriris, kaj de vi, urso, mi eĉ pli facile foriros!" Kaj ekruliĝis pluen.


Renkontiĝis al kukobulo ruza vulpino. Kaj diras al li:

"Kukobulo, kukobulo! Mi vin formanĝos!"









Sed kukobulo respondas:

"Mi estas tra farunujoj skrapita, tra grenejo balaita, en fornon metita, sur fenestro malvarmigita! Mi de avo foriris kaj de avino foriris! Mi de leporo foriris, de lupo foriris, de urso foris, kaj de vi, vulpino, mi eĉ pli facile foriros!"

Kaj vulpino diras: "Ah, kiel interese! Sed mi jam aŭdas malbone. Sidiĝu sur mian nazon kaj rakontu ankoraŭ foje!"

Kukobulo ekĝojis, ke oni ĝin aŭskultas, saltis sur vulpinan nazon kaj ekkantis:

Foje maljunulo diras al maljunulino: "Baku, edzino, kukobulon!"

Kaj maljunulino al li respondas: "Ĉu vi freneziĝis? Ni jam dum semajno ne havas farunon!"

"Sed vi, edzino, tra farunujoj skrapu, tra grenejo balaŭ! Eble kolektiĝos da faruno por kukobulo!"

Jen ekiris maljunulino, skrapis tra farunujoj, balais tra grenejo... Kaj kolektis sufiĉe da faruno por kukobulo!



Renkontiĝis al kukobulo leporeto-saltuleto.

Kaj diras al li:

"Kukobulo, kukobulo! Mi vin formanĝos!"

Sed kukobulo respondas:

"Mi estas tra farunujoj skrapita, tra grenejo balaita, en fornon metita, sur fenestro malvarmigita! Mi de avo foriris kaj de avino foriris! Mi de leporo foriris, kaj de vi, lupo, mi eĉ pli facile foriros!" Kaj ekruliĝis pluen.

Renkontiĝis al kukobulo urso kurbakrura. Kaj diras al li:

FINO

"Mi estas tra farunujoj skrapita, tra grenejo balaita, en fornon metita, sur fenestro malvarmigita!.."

Sed vulpino ĵetis lin per nazo, malfermis buŝon kaj forglutis.

Vivis-estis maljunulo kaj maljunulino.

